# *Díaz-Canel elstarigas avancojn de sanitara interveno kontra? Kovim-19*




**Foto: Granma**

Havano, maj 18 (RHK) La prezidento Miguel Díaz-Canel emfazis la avancon de la sanitara interteveno farata de Kubo per sia vakcina kandidato kontra? Kovim-19, Abdala, en grupoj kaj teritorioj riskaj tutlande.

Per mesa?o en Tvitero, la ?tatestro emfazis ke pli ol 445 mil volontuloj jam ricevis la unuan dozon de la medikamento evoluigita de kubaj sciencistoj.

Ricevi la vakcinon estas suvereno-festo. En la vakcinejoj oni travivas memorindajn horojn, li precizigis. Dum kunsido de la registara grupo por kontrolo de la malsano, kiun anka? gvidis la ?efministro Manuel

Marrero, la ministro pri publika sano, José Ángel Portal, asertis ke pli ol 186 390 havananoj jam ricevis la unuan dozon.

Kubo raportis la plej malbonajn ciferojn de la pandemio pasintsemajne kun avera?a nombro de 1 200 konta?oj tagaj kaj 10 forpasintoj, la? informoj de la ministerio pri sano.

La plej malbonaj indikioj dum la semajno estis en Havano, poste Santiago de Kubo (oriento), Artemisa (okcidento) kaj Camagüey (oriento), provincoj akumulantaj 84,6% de la raportitaj kazoj.

Meze de tiu ?i kompleksa epidemiologia situacio, Kubo ekigis la sanitaran intervenon  pasintsemajne tutlande, kaj   en sektoroj de kvar municipoj havanaj plus ?iuj gelaboristoj de la sansektoro kaj aliaj risko-grupoj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/257674-diaz-canel-elstarigas-avancojn-de-sanitara-interveno-kontrau-kovim-19

**Radio Habana Cuba**